

Justinus Kerner,
Migrado-kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Nun estu trinkata
Brilanta la vin'.
Karuloj, mi devas
forlasi nun vin.
Adiaŭ, vi montoj,
Kaj patra vi dom',
Pelata mi estas,
migrema mi hom'.

La suno ne restas
Sur lok' ĉe l' ĉiel'.
Ĝi iras antaŭen
Laŭ sia korpel'.
La ondo ne restas
Solece ĉe l' strand',
La ŝtormo bruadas
Potence tra l' land'.

Kun hasta nubaro
La bird' flugas jen
Kaj kantas enfore
Pri sia reven'.
Peliĝas nun same
La hom-junular'
Por migri eksteren
Tra lando kaj mar'.

...

Salutas lin tie,
Jen super la mar'.
El lia hejmlando
Veninta birdar'.
Odoras hejmece
Ĉirkaŭe de li,
Peliĝis aere
Ĝis tie ĉi.

La birdoj rekonas
La domon de li,
La florojn li plantis
Pro am' tie ĉi.
La amo, ĝi sekvis
Lin ja ĉie ci,
Hejmeca fariĝas
La foro por li.

*Traduko de la Germana poemo "Wanderlied" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2014.*

Arg-1093-2203 (2014-10-14 23:43:02)

La poemoj de Justinus Kerner troveblas ankaŭ en <http://www.zeno.org/Literatur/M/Kerner,+Justinus/Gedichte/Die+lyrischen+Gedichte>.